Johann Wolfgang von Goethe,

# Elfregho

*tradukita de Richard Schulz*

Malfrua ĉeval' en nokta vent'?
La patro estas en korturment'.
Enbrake tenas infanon li,
sekure, tamen kun zorg' pri ghi.

Fileto, kial vi timas nur? -
Eksonas, paĉjo, elfa murmur'.
Jen glitas reĝo kun elfoj mil. -
Nebul' ĝi estas, mia fil'. -

“Ho, ĉarma knabo, sekvu min!
Juvelojn havas mia patrin'.
Kolorajn florojn ricevos vi,
Kaj vi ludos gaje kun papili'.”

Ho patro, ho paĉjo, la elfreĝo jen!
Li logas min for al luksa festen'! -
Ne timu! Dormu, mia etul'!
Susuras arboj en la nebul'. -

“Nu venu, fajna knabo, kun mi!
La princinoj zorgos kun ĉarm' pri vi.
La princinoj dancos dumnokte en rond'
Kaj kante vin lulos en bela rotond'.”

Ho patro, ho paĉjo, filinoj de l' reĝ'
Insidas tie malantaŭ la heĝ'. -
Mi bone vidas, mia filet',
De grizaj salikoj jen estas aret'. -

“Mi nepre vin bezonas por mia eskort'.
Se vi ne konsentas, estiĝu perfort'!” -
Ho patro, ho paĉjo, ve, kia kruel'!
Elfreĝo venis al sia cel'! -

La patro rajdas kun granda rapid'.
Li timas. En brak' lia ĝemas la id'.
Li pene venas al la kort'.
La knabon prenis jam for la mort'.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

# Erlkönig

Wer reitet so spät durch Nacht und Wind?
Es ist der Vater mit seinem Kind;
Er hat den Knaben wohl in dem Arm,
Er fasst ihn sicher, er hält ihn warm.

Mein Sohn, was birgst du so bang dein Gesicht? —
Siehst, Vater, du den Erlkönig nicht?
Den Erlenkönig mit Kron' und Schweif? —
Mein Sohn, es ist ein Nebelstreif. —

„Du liebes Kind, komm, geh mit mir!
Gar schöne Spiele spiel' ich mit dir;
Manch' bunte Blumen sind an dem Strand,
Meine Mutter hat manch gülden Gewand.“ —

Mein Vater, mein Vater, und hörest du nicht,
Was Erlenkönig mir leise verspricht? —
Sei ruhig, bleibe ruhig, mein Kind;
In dürren Blättern säuselt der Wind. —

„Willst, feiner Knabe, du mit mir gehn?
Meine Töchter sollen dich warten schön;
Meine Töchter führen den nächtlichen Reihn
Und wiegen und tanzen und singen dich ein.“ —

Mein Vater, mein Vater, und siehst du nicht dort
Erlkönigs Töchter am düstern Ort? —
Mein Sohn, mein Sohn, ich seh' es genau:
Es scheinen die alten Weiden so grau. —

„Ich liebe dich, mich reizt deine schöne Gestalt;
Und bist du nicht willig, so brauch' ich Gewalt.“ —
Mein Vater, mein Vater, jetzt faßt er mich an!
Erlkönig hat mir ein Leids getan! —

Dem Vater grauset's; er reitet geschwind,
Er hält in Armen das ächzende Kind,
Erreicht den Hof mit Mühe und Not;
In seinen Armen das Kind war tot.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Erlkönig" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* RICHARD SCHULZ *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-588-1186 (2014-03-14 13:06:19)*

*Tiu chi traduko aperis en 1981-07-01 en la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz (Rikardo Shulco) mem. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-588-1185 (2013-02-26 14:59:44)*

*Pri la verkinto vidu la retejon* `http://de.wikipedia.orgwikiJohann_Wolfgang_von_Goethe`*, pri la tradukinto la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski`*. Pri la balado vidu:* `http://de.wikipedia.org/wiki/ErlkГynig_(Ballade)`*. La muzikon, kiun verkis la germana komponisto Franz Schubert, oni povas aŭdi en la reta video* `http://www.youtube.com/watch?v=e40Mm8baD7A`*. Pri la komponisto informiĝu en* `http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Schubert-`